# Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2023

## Okazintaĵoj

### Klubaj kunvenoj

Pro la pandemio okazis komuna jarkunveno por 2022 kaj 2023 la 6an de marto 2023 (6 plenkreskaj partoprenantoj, 8 entute). Krome okazis 1 estrara kunveno, 1 ĝardena festo (10 plenkreskuloj kaj 3 infanoj) kaj 10 ordinaraj kunvenoj kun averaĝe 5,5 ĉeestantoj. Kompare, en la pandemiaj jaroj 2020–2022 ĉeestis la ordinarajn kunvenojn averaĝe 6,8 en 2020; 5,7 en la interretaj kunvenoj en 2021; kaj 4,8 en la fizikaj kunvenoj en 2022. En la lasta jaro antaŭ la pandemio, 2019, partoprenis averaĝe 4,7. Ne okazis Zamenhofa festo en 2023, ĝi prokrastiĝis ĝis la 12a de januaro 2024 (8 plenkreskuloj kaj 2 infanoj).

### Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en Trondheim en 2023.

### Membrostatistiko

En 2023 GET havis 12 membrojn kun poŝtkodo 7000–7100 laŭ informoj de la kasisto de NEL, do 13 membrojn se oni kalkulas eksterurban membron. (Por la jaroj ekde 2006 la nombroj estis respektive: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, 15, 16, 16, 14, 13, 12, 11, 13, kaj 13 en 2022.). Ekde 2019 NEL kalkulas la klubsubtenon laŭ la membronombro la 31an de oktobro, antaŭe la 31an de decembro.

### Partopreno en naciaj aranĝoj

La 1an de junio 2023 okazis la Landa Kunveno de NEL per la interreta konferencprogramo Zoom. Partoprenis 3 el Trondheim: Jardar E. Abrahamsen, Judith P. Abrahamsen kaj Herman Ranes.

### Partopreno en internaciaj aranĝoj

En 2023 Herman Ranes partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Torino. Per la interreta konferencprogramo Skype pluraj membroj partopretis ĝemelurbajn konversaciojn de la klubo en Darmstadt, tamen ne samtempe: Herman Ranes, Ulf Stenhaug, Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith P. Abrahamsen.

### Vortara laboro

Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Ne estis aktiveco dum 2023.

### Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Jardar ankaŭ administris la retpoŝtajn listojn GET-lista kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE.

Je la jarfinoj de 2023 membris 18 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2022 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, 22, 20, 19, 19, 19, 16, 16, 16, 16). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2023 sendiĝis 34 mesaĝoj per la listo (por la jaroj 2012–2022 respektive: 68, 96, 45, 56, 38, 66, 51, 97, 20, 37, 42).

### Biblioteko

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes.

### Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

**Pasporta servo kaj aliaj vizitoj**
Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/ Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2023.

**Ekstera mono**
Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2023 Norsk Tipping pagis al la klubo 6782,86 kronojn (4112,45 en 2022).

## Postenoj

**Estraro dum 2023, elektita de la Jarkunveno la 6an de marto 2023**
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

**Aliaj enklubaj postenoj en 2023, elektitaj de la Jarkunveno la 6an de marto 2023**
Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto, kondiĉe ke li pagos kotizon) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

**Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2023**
Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

**Estraraj postenoj de klubanoj en NEL kaj Legaco Uhlen en 2023 post la Landa Kunveno**
Vicprezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Revizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Estrarano kaj prezidanto de Legaco Uhlen: Herman Ranes
Estrarano de Legaco Uhlen: Judith Parelie Abrahamsen
Estrarano de Legaco Uhlen: Ulf Lunde (loĝanta en Os)

**Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2023**
Prezidanto de la ne plu funkcianta Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de la sama: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad
Reprezentanto por NEL en la Domkomisiono: Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegito de UEA: Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 14an de oktobro 2024.